

# Novajaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

## TIEL OKAZIS

### ZAMENHOF-FESTO EN KAWASAKI

\*la 15-a de decembro 12h30-17h00, en la Internacia Centro de Kawasaki

La Zamenhof-Festo de la 4 Esperanto-grupoj en la gubernio Kanagawa ĉi-jare okazis en Kawasaki, zorgite de la Esperanto-Societo de Kawasaki. Entute ĉeestis 42 personoj, el kiuj 17 el nia rondo en Jokohamo. Poste, 14 el ili ĉeestis bankedon en la sama halo.

Post la malfermo fare de Kawasaki-anoj, s-ino Kato Yooko kaj s-ro Okunuki Kentaroo, sinsekvis saluto de aliaj rondoj, t.e. tiuj de Jokohamo, Fuĵisawa kaj Odawara. Nome de Jokohama E-Rondo salutis s-ino Miyazaki Hideko ĝenerale, kaj s-ino Murata Kazuyo klarigis precipe pri la klaso "Salono", en kiu oni aŭ legas, aŭ



s-ino Miyazaki el Jokohamo kaj s-ro Okunuki el Kawasaki

mem verkas aŭ tradukas esperanten. Uzante lumbildojn, ges-roj Sibayama Zyun'iti kaj Noriko parolis pri la spertoj de la 7-a Azia Kongreso en Israelo kaj la 98-a Universala Kongreso en Islando. Sekvis prezento de vendotaj libroj de s-ino Doi Ĉieko. Kaj estis te-paŭzo, kiam oni povis viziti standon de la libroservo.

Paŭzinte, oni ĝuis la duan parton. Tie, s-ro Kitagawa Hisasi (el Kawasaki) prelegis japane pri sia tradukado de "Poemoj de Tanikawa Shuntaro en Esperanto", kiun li serie aperigas de la maja numero de "La Revuo Orienta" de JEl, daŭranta ĝis la venonta aprilo. Li klarigis kialon de la tradukado, kaj ankaŭ kielojn, ekzemple utiligo de franca-esperanta vortaro. Aŭskultinte, la partoprenantoj duiĝis. Unu el la du grupoj daŭre sekvis s-ron Kitagawa, en laborkunsido pri prova tradukado el la sama aŭtoro Tanikawa Shuntaro, nome Kitagawa montris tri poemojn por ke la grupanoj mem provu sian tradukon. La alia grupo estis por konversaciado en Esperanto, en kiu rolis gasto s-ino Aleksandra Watanuki – el Pollando devene, sed ĉi-tage el tokia hejmo. En la fino, la verda standardo estis transdonita al Jokohama Esperanto-Rondo, por ke la Zamenhof-Festo en 2014 okazu en Jokohamo.

### JARFINA FESTENO DE LA RONDO

\*la 21-a de decembro vespere, en la ĉina restoracio Fukuyoken, 17 personoj frandis kaj ĉinajn pladojn kaj babiladon.

- Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
- Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
- Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
- Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)



## NIAJ PLANOJ

### ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

\*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Klaso por legado de “Tra dezerto kaj praarbaro” (finita en decembro): daŭre gvidos la klason Doi Ĉieko, jen legante artikolojn, jen verkante, jen tradukante, (2) Klaso por legado de “Vivo de Lanti” / (3) Jokohama Salono / (4) Daŭriga kurso

\*Regula Klaso en merkredo por legado de “Punkuino”.

\*Rudimenta Klaso en ĵaŭda vespero, de oktobro ĝis februaro --- kun unu sola lernanto.

### LA JARKUNVENO DE JOKOHAMA ESPERANTO-RONDO

\*la 26-a de januaro en Tikyuu-simin-plaza

Ĝi estos la plej supera decid-organo de nia rondo, en kiu ni resumos la jaran buĝeton kaj la raporton, kaj fiksos tiujn por 2014.

### EN “INTERNACIA FORUMO” DE JOKOHAMO

\*la 9-a de februaro, 12h00-12h50, en la domo de JICA

Ni partoprenos en prelegaron, kiun organizos komitato de la rondoj aktivaj pri internaciaj agadoj en nia urbo, kaj tie prezentos nian rondon, kiu agadas en diversaj kampoj de internacia agado – prezenton de la japana kulturo al aliaj landoj, gastigon de alilandaj gastoj, forumo por internacia diskutado ktp.

## 93a Legokunsido

En la 7a de decembro okazis legokunsido, kun 8 venintoj. La titolo de la legita libro estas

“Punkuino kaj aliaj nepalaj rakontoj”

### Punkuino kaj aliaj nepalaj rakontoj

Mizro Iwaya

Tiu ĉi libro enhavas sume 25 pecojn da nepalaj antikvaj rakontoj. Mi iam legis tiujn de japanaj kaj ankaŭ alilandaj. Estas ja kompreneble ke ili havas iusence komunan tendencon, ĉar ekzistas iom da ligiteco inter tiuj landoj. Sed al mi estis surprize ke mi trovis tre similan rakonton en “arabaj mil unu noktoj” rilate al la 25a rakonto “Leciono de edzino”. Ĉu Silka Vojo ligis ankaŭ Nepalon? Eĉ pli granda surprizo estis ke greka klasika verko “Simpozio” de Platono havas epizodon similan al la sepa rakonto “Diamanta pendaĵo”. Eble homa menso havas komunan tendencon tra la mondo.

La tuta libro estas facila kaj intima. Ĉiu rakonto estas mallonga. Esperanta frazaro estas bone rafinita. Oni povas facile ĝin legi kaj gustumi laŭ sia plaĉo.

### Pri “Punkuino”

SIBAYAMA Noriko

Inter tiuj ĉi 25 rakontoj troviĝas multaj similaj rakontoj al la japanaj, tamen kelkaj el ili donis al mi impreson iom ne kutiman.

Unu el ili estas “Riĉulido”. Tie la ĉefrolulo, riĉulido, estas pendigota pro falsa krimo. Kial senkrimulo devas esti punata? Kion aludas la rakonto? Ĉu simple “riĉa” estas krimo?

Alia ne kutima rakonto estas “Paketo da kameloj”. Ĝi estas absurda sensencaĵo, tamen tian pecon kredeble infanoj ŝatas.

Min interesis apero de ogrino kaj geogroj. En japanaj popolarakontoj mi ne vidis ilin sed nur virajn ogrojn. Ĉu aperas ogrido(j) en japana rakonto? Se jes, ankaŭ ogrino(j) devas esti...

Ĉu ni estas permesataj senkondiĉe rabi trezoron de demono? Ĉu demono kaj ogo estas simbolo de malbonuloj? Ne ekzistas bona demono aŭ ogo? Multaj roluloj komence malriĉaj fariĝas fine riĉaj rabinte trezoron

de ogro (demono), sed ĉu riĉo simple signifas feliĉon?

## Kio estas ogro en nepalaj rakontoj?

Sibayama Zyun'iti

En la libro “Punkuino kaj aliaj nepalaj rakontoj” aperas tipaj figuroj en popolaj rakontoj, kiel la saĝa kaj feliĉiĝanta plej juna filino, ktp, sed min plej impresis ogro, ogrino kaj geogroj, t.e. edza kaj edzina ogroj.

En la japana rakonto, superhoma figuro nomata “oni” estas ĝenerale tradukata per ogro, kaj ni japanoj havas ian komunan bildon pri ogro, sovaĝa viro, ruĝ- aŭ blu-haŭta, kun korno. En eŭropo, estas vorto komuna al “ogro”, do tia estulo estas supozata. Sed kia estas ogro nepala? – mi bedaŭras, ke mankas bildoj pri

ogro en tiu ĉi libro. Sed la situacio, ke edza kaj edzina ogro kune intrigas kapti homon, estas io nekonata ĉe ni. Cetere, la esprimo, ke ogro loĝas en granda domo, signifas, ke ogro havas sufiĉan potencon. En la japana studo pri folkloroj, oni atribuas al ogro, tribon kontraŭan, timindan sed fine konkeritan de la ĉefa tribo, kiu nun superregas la landon. Ĉu la similaj historiaj faktoj troviĝas malantaŭ la rakontoj?

Nu, mi levas tute alian, traduk-manieran temon. Ĉi tie, du ĉefrolulaj virinoj estas nomataj Punkuino kaj Sinhapatino. Laŭ la klarigo de s-ino Doi, la unua rakonto estas konata en Japanio per la tradukaĵo nomata “Punkumainĉa”. Do la esperantiginto, kredeble Razen Manandhar, tiel tradukis la nomon. Ĉu tio estas bona maniero? Mi ne povas juĝi, sed estas interesa traktado.

---



---

## ESEO

---



---

## Aŭtunaj kursoj de Jacugatake 2013

MURATA Kazuyo

Tuj post la 100a Japana Esperanto-Kongreso, okazis speciala programo en la Jacugatake Esperanto-Domo en oktobro. Partoprenis en ĝi 8 eksterlandaj gastoj kaj 9 japanoj inkluzive de 4 zorgantoj. La plej danka aranĝo estis, ke ĉiuj manĝaĵoj estis servitaj de gesroj Iwaya. Precipe menciinde estis, ke la japanstilajn manĝaĵojn kun desertoj ili ofertis.

La programeroj estis buntaj: prelegoj 6 kaj 2 koncertoj.

1. S-ro Komori Joŝiki (Kanado): “Vidpunkto de kanadanoj pri Japanio” / 2. S-ro Horii Jasuo (Japanio): “Suferoj en la japana katastrofo” / 3. S-ro Markus Gabor (Hungario) : “El malgrandaj Papavsemoj kresku grandaj papav-arboj” / 4. S-ro Marko Shmidt (Aŭstralio) : “Prezentado pri lia verko: Rakonto de Ovoj” / 5. S-ino Paola Giommoni(Italio): “Esperanto-Kursoj en Togolando” / 6. Navaraj Budha(Nepalo): “Himalaja renkontiĝo”

Bedaŭrinde mi ne povis aŭskulti la lastajn 2 prelegojn.

Kvar prelegoj ĉiuj estis interesaj, sed nun mi deziras prezenti la parolon de s-ro Komori.

Unue li prezentis sian vivon en Kanado, urbo Calgary. Pli ol 40 jaroj li vivas tie kun sia familio, kaj gajnis la naciecon de Kanado antaŭ 30 jaroj. Responde de la demando, kial li perdis sian japanan naciecon, li parolis jene:

Li komencis rakonti la historion de sia familiano.

Lia avo en 1904 batalis kun Rusio, kiel oficiro de japana armeo, kaj post la reveno, la avo ricevis emerituron de registaro. Sed post la dua mondomilito, militistoj estis konsideritaj kiel militkrimuloj. Pro tio li ne povis plu ricevi ĝin. Dume lia patro estis esperantisto kaj pacamanto. Lia avo rekomendis al la filo iri al milit-akademio, sed la patro rifuzis. Pro tio li fariĝis instruisto. En la fina periodo de la dua mondomilito, de registaro venis ordono iri al la militakademio kiel instruisto. Li ne povis rifuzi ĝin kaj laboris tie. Post la milito, eĉ li estis rigardita kiel krimulo, kaj forpelita.

Japana registaro estas vere severa al la popoloj. Sed la registaro de Kanado estas ne tiel malvarma eĉ al migrantoj. Ĉiujare 200 mil homoj estas akceptataj el la tuta mondo. Kiam s-ro Komori komencis labori tie, la salajro estis minimuma 2\$ hore. (Nun estas 8\$)

Por havigi domon, la registaro donacis 30% da mono al laboristo, kiu laboris pli ol 3 jarojn. Danke al tiu sistemo li havis domon post 3 jaroj. Ĉiu edukado kaj sankuracado estas senpaga; eĉ naski bebon senpage. Kaj pensio estas sufiĉa. Kiam lia enspezo malmultiĝas kompare kun la suba nivelo, la registaro redonos al li la imposton, kion li pagis. Se gefiloj laboras en Kanado, ili povas translokigi la gepatrojn, kaj se la gepatroj loĝas pli ol 10 jarojn, ankaŭ ili povas ricevi 70% da pensio. Ĉu vi deziras plu vivi en Japanio?



Tiu ĉi kanto estis kantita de la membroj de la koruso de Jokohama E-Rondo kaj aliaj, okaze de la 100-a Japano E-Kongreso en 2013. La origina kanto japanlingva estis ne multe konata, sed nia grupo petis s-ron Konisi esperantigi kaj kantis ĝin publike. Ni publikigas ĝin du-lingve. La poeto Akita Uĵaku kaj la muzikisto Yamada Kōsaku estis esperantistoj. Por akiri muziknoton, kontaktu s-inon Murata Kazuyo ĉe murata.kazujo@gmail.com

### Floro de Orkid'

Poezio de AKITA Uĵaku,  
tradukita de KONISI Gaku,  
Kantata kun la muziko de YAMADA Kōsaku

Infanoj karaj, leviĝu el lit!  
Ekfloris jen eta, bela flor'.  
Ekfloris jen la flor' tre bela de orkid'.

Mi tute ne atendis, sed brave floras ĝi.  
Ho, ravas jen la kolor'.

Infanoj karaj, leviĝu el lit!  
Ekfloris jen eta, bela flor',  
tre blanka, rava floro de orkid'.

Miraklo estas por mi la floro de orkid'.  
Ho, brave ekfloris ĝi,  
ekfloris kun bela kolor'.

### 蝶蘭の花

秋田雨雀原作  
小西岳エスぺラント訳  
(山田耕筈作曲の曲で歌われる)

子供らよ 起きてこい  
花が咲いたよ  
蝶蘭の花が咲いたよ

咲かぬと思った蝶蘭の  
花が咲いたよ

子供らよ 起きてこい  
花が咲いたよ  
ま白な花が咲いたよ

咲かぬと思った蝶蘭の  
花が咲いたよ  
花が咲いたよ



Redaktanto  
salutas



### Feliĉan Novjaron!

Alilandaj legantoj indulgu, ke ni metis japanlingvan originalaĵon paralele al Esperanta traduko. Por poeziaj verkoj, ni provas tian metodon. Tiu ĉi organo "Novaĵoj Tamtamas" estas enretigita kaj alirebla kaj al japanaj kaj al alilandaj esperantistoj, kaj ni preferis aperigi la paralelaĵon tie.